

# Estrara interkonsiliô de NEL 2017-01-12 per Skype.

Mario Machlik, Amelie Matt, Anne Karin Bondhus, Jardar Eggesbø Abrahamsen, Hilde Dahlberg, Ulf Lunde.

## 0. Tagordo

Aprobita.


## 1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliô, la 8-an de decembro

Aprobita.

## 2. Ekonomio

Skagen Vekst 54 947 kr (52 474 kr).

Skagen Høyrente 130 360 kr (130 030 kr).



### **3. Landa kunveno 2017**

La datoj por la aranĝo estas nun fiksitaj al la 2a ĝis la 4a de junio 2017. (La 5a de junio estas publika libertago pro Pentekosto.)

Ni atentigu la membrojn per Norvega Esperantisto pri tio kaj memoriĝu ilin, ke la limdato por proponoj pri statutŝanĝoj k.s. estas la 1a de marto.

Malneta programo kaj aliĝilo devas esti publikigita (per Norvega Esperantisto) plej malfrue la 2an de aprilo.

Detalan tagordon kaj proponon pri nova laborplano ni devas dissendi (per Norvega Esperantisto) plej malfrue unu monaton antaŭ la Landa Kunveno.

### **4. Jarraporto, jarkalkulo**

Estas tempo por komenci la laboron: kolekti nombrojn ktp.

Dum la venonta interkonsiliĝo ni ekredaktos la dokumentojn por 2016.

### **5. Ĝisdatigo de la Vikipediaj paĝoj pri Esperanto kaj pri NEL**

Ŝajnas, ke fakte estas iom da atento pri Esperanto nuntempe:

Aperis granda artikolo pri Esperanto en la lasta numero de Aftenposten Innsikt.

P3 Radio antaŭ kelkaj tagoj telefonis al Mario Malchik kaj Amelie Matt pri ebla somera programserio pri Esperanto.

En februaro la televidkanalo NRK1 intervjuos Ulf Lunde pri Esperanto por la programserio "Eides språksjov".

Tial ni devus kontroli, ke niaj norveglingvaj sinprezentoj en TTT kaj Vikipedio estas bonaj kaj kiel eble plej ĝustaj, kaj ke ili havas ligilojn al la plej aktualaj retejoj por lerni Esperanton.

La estraro kontrolis [www.esperanto.no](http://www.esperanto.no), [no.wikipedia.org](http://no.wikipedia.org), kaj [nn.wikipedia.org](http://nn.wikipedia.org) kaj trovis ilin ne malbonaj. Almenaŭ ne endas fari iujn urĝajn korektojn.

### **6. Datoj por la venontaj interkonsiliĝoj**

La estraro elektis la jenajn datojn: 23/2 30/3 20/4 11/5.

### **7. Eventualaĵoj**

Nenio protokolinda.

**Dato por la venonta interkonsiliĝo:** 23-a de februaro

Protokolis: Ulf Lunde